

BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner - Esperantisten im Bundesbahn - Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 3

majo / junio / julio 1990



Sukcesplena IFEF-Kongreso en Norvegio



Einweihung der Esperanto-Straße in Hamar mit IFEF-Präsident Gießner, Bürgermeister Egil O. Larsen und Vizepräsident Istvan Guljas.
Foto: Erhard Herlitze

Demisio de la ĝisnuna kaj elekto de nova IFEF-prezidanto, multnombraj partoprenintoj el orientaj landoj, inaŭguro de Esperanto-strato, fervojfakaj aktivaĵoj, distingo per FISAIC-medalo - tiuj estis la elstaraj elementoj de la 42a Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso inter la 2a kaj 8a de junio 1990.

Gastiganta urbo estis la sudnorvega mezgranda urbo Hamar. Situante tute proksime al la stacidomo ofertis la urbodomo kiel kongresejo bonkvalitajn salonojn por preskaŭ ĉiuj aranĝoj. Multaj kongresanoj povis loĝi en apudaj hoteloj. LKK, fervojo kaj privataj iniciativoj certigis, ke la orientaj kongresanoj povis loĝi en siaj kuŝvagonoj kaj ricevi senkostajn manĝojn. Unuafoje en la historio de IFEF la nombro de la gekolegoj el GDR estis pli granda ol tiu de GEFA.

En sia bonveniga alparolo s-ro Larsen, urbestro de Hamar, atestis dum la solena malfermo sian altan estimon kaj subtenon al Esperanto, sed ankaŭ montris sian komprenon pri la nuntempaj problemoj de la fervojo. La Norvegajn Ŝtatajn Fervojojn (NSB) reprezentis direktoro Ødegaard, kiu diris i.a., ke post la disfalo de muroj kaj limoj la manko de komuna lingvo restas forta barilo, tamen solvebla pere de Esperanto. Por Universala Esperanto-Asocio (UEA) bonvenigis la 400 kongresanojn el 22 landoj la konata akademiano profesoro Størp-Bowitz. Laŭde li akcentis la gravan laboron de la fervojistaj esperantistoj. IFEF ja apartenas al la plej aktivaj fakaj asocioj aliĝintaj al UEA. Salutojn transdonis s-ino Erikson por FISAIC, la Internacia Federacio por Kulturo de Fervojistoj, kaj s-ro Kreim por la Norvega Esperantista Ligo. Nome de Germana Esperanta Fervojista Asocio salutis unuafoje s-ro Ullmann. Unuafoje ankaŭ aperis sur la scenejo rumana delegito. Fine la IFEF-prezidanto Giessner esprimis sian sinceran dankon pro la bonega organizado kaj pro la helpo de diversaj fervojaj instancoj kaj privata helpo ebligis al la orientaj gekolegoj la partoprenon al la kongreso. La demisianta IFEF-prezidanto forte esperas, ke la gravaj ŝanĝoj en meza kaj orienta Eŭropo esprimu sin ankaŭ en kreskanta membraro de IFEF malgraŭ la malfavora situacio de la fervojoj. Sed li atentigis ankaŭ pri danĝeraj kaj urĝe solvendaj mondaj problemoj kaj deklaris sub ĝoja aplaŭdo la 42-an IFEF-kongreson malfermita. La solenaĵo akompanis muziko de grandnombra fervojista blvorkesto de Hamar. I.a. oni ludis la Esperantomarŝon de Richard Maier, kies perditaj notoj retroviĝis antaŭ kelkaj jaroj en Fulda. Denove la orkestro aktivis, kiam la kongresanoj defiladis tra la urbo, por inaŭguri, pere de la urbestro, Esperanto-straton. Ĝojiga ankaŭ la aspekto de la uniformitaj fervojistoj el diversaj landoj. Super ĉio brilis tiun dimanĉon samkiel

dum la tuta semajno la suno ĝis preskaŭ meznokto.

Volonte sekvis la kongresanoj la inviton viziti la tiean fervojan muzeon, en kiu precipe eŝpura pasaĝertrajno, tirita de preskaŭ centjara, germandevena vaporlokomotivo, stimulis al kunveturado. La modernan fervojon kontraŭe prezentis la fakprelego pri la nova stacio de Oslo. Miregis la arkitektura solvo krei el du apartaj stacioj unu solan. Naŭ landaj asocioj, bedaŭrinde ne GEFA, raportis pri aktualaj, parte kompletigitaj per lumbildoj kaj filmoj. Detalojn pri ĉiuj prelegoj vidu en la IFEF-organo Internacia Fervojisto. La taskoj de la Faka Aplika Komisiono fariĝis pli ampleksa. En la kunsido oni interkonsentis verki ankaŭ estonte sur popolarscienca nivelo. Estu permesotaj spontanaj kontribuadoj al la temo „aktualaj“: La Terminara Komisiono determinis siajn venontajn taskojn kaj celojn: evoluigi nacilingvajn vortarojn, difinan vortaron kaj aktualan fervojan vortaron. La redaktora kunveno traktis modifon de la IFEF-organo kaj petis verkantojn respekti aŭtorajn rajtojn kaj obei al lingvaj reguloj.

Inter la multnombraj tagordaj punktoj estu menciataj tie ĉi nur kelkaj. Por la eksiganta prezidanto Giessner estas elektita la norvego Engen. La dana kasisto Hauge reelektiĝis.

GEFA bonvenigas la novelektitan IFEF-prezidanton, kiu estas vaste konata en IFEF kaj en gvidaj fervojaj instancoj. Kun emocio s-ro Giessner akceptis la elekton kiel honora prezidanto. Liajn meritojn dum 22jara agado por IFEF laŭdis la nova estraro kaj transdonis al li donacon. S-ro Olsen kiel reprezentanto de FISAIC transdonis kortuŝe al GEFA la oran FISAIC-medalon por honorigi la meritplenan s-ron Ritterspach post lia neatendita morto. IFEF akceptis kun ĝojo kiel landajn sekciojn sen voĉdonrajto Slovakion kaj Estonion. La invito por la 43a IFEF-kongreso al Brno (Ĉeĥoslovakio) estas nun definitiva. En la sekva jaro la 44a IFEF-kongreso okazos inter la 16a kaj 25a de majo 1992 en Münster (Vestfalia). Multan intereson renkontis la ampleksa raporto de la vicprezidanto Gulyas pri la agado de la landaj asocioj aperanta en la Internacia Fervojisto.

Neniu kongreso sen kulturaj kaj turistaj programoj. La ekumenan diservon en la katedralo partoprenis multnombraj vizitantoj. Ili preĝis kaj kantis laŭ aparta libreto. Same en la katedralo okazis vespera koncerto. La virĥoro gvi-

dita de impresiga virino prezentis esperantigitajn klasikajn kantojn parte akompanitajn de konvena orgenludo. Je la fino ĉiuj kantis emociu: gentoj foriris, kaj sekvos ni. Estis vespero, kiu restos en memoro. Dum la kultura vespero en la urbodoma salonego regis precipe muziko, bonkvalite kaj plaĉe prezentita de la menciita fervoja blovorkestro kaj de tirharmonika klubo. Iom alie ol atendite estis la popoldancoj. Dignoplene montris taĉmento en burĝaj kostumoj de la lasta jarcento, kiel elegante paroj dancis laŭ malrapidaj melodioj de la tiama epoko. La Espero kaj la norvega nacia himno finis la vesperon. Menciinda estas ankaŭ la abunda bufedo de la bankedo kun la sekva dancado, tamen ne komparebla kun tia vespero en suda lando.

Per speciala trajno, adiaŭite de la fervojista blovorkestro sur la kajo, la kongresanoj vojaĝis norden tra belega, fekunda regiono, sub brila suno, ĝis la montara urbo Røros. Vidindaj estis tie domoj kaj stratoj el la periodo, kiam oni ekspluatadis kupron en minejoj. Tomboj kun germanaj nomoj montras, ke enmigris siatempe multaj familioj el Germanio. En la impona preĝejo oni surprizigis la vizitantojn per orgena muziko. La alia ekskurso, same per Espe-

ranto-trajno, kondukis al la fino de la plej granda lago Mjøsa. Tie, apud Lillehamer, troviĝas subĉiela muzeo de lignaj konstruaĵoj el antaŭaj jarcentoj; plej multe estis unuetaĝaj domoj kaj staloj, sed ankaŭ preĝejo en tipe norda stilo. La diversaj grupoj rajtis rigardi ankaŭ la internon de la patriciaj domoj. Ankoraŭfoje la ekskursantoj kolektiĝis por komuna laŭdire tipe norvega manĝo. Post dankvorto de belgo la prezidanto deklaris la kongreson finita. Ĉeĥa LKK transprenis la flagon.

Tiu raporto ne povas esti kompleta. Ekzemple mankas detaloj pri la bone funkciantaj ĝiĉetoj, vendejoj por libroj, flagrubandoj, bildkartoj, speciala poŝtstampo, aliĝo por la venonta kongreso. Estas mirinde kiel nur kvar viroj subtenitaj de sia familio majstris la organizadon de aranĝoj, sen perdi sian afablan kaj ĝentilan konduton. Estis LKK-prezidanto Krogstie, vicprezidanto Engen, kasisto Bergh kaj sekretario Bye. Ni germanaj partoprenintoj sincere kaj kore dankas al ili. La 42a kongreso de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio prave meritas la atributon „sukcesplena kaj neforgesebla“. Ĝis revido en majo 1991, kiam IFEF kongresos la unuan fojon en Ĉeĥoslovakio!

W. B.

Esperanto-Kongreß in Norwegen

Die Kongreßstadt Hamar zeigte sich von ihrer schönen Seite. Die Junisonne strahlte bis in die späten Abendstunden. Bei der Eröffnung des 42. Kongresses des Internationalen Verbandes der Eisenbahner-Esperantisten (IFEF), der vom 2. bis 8. Juni 1990 dauerte, ließ es sich der Bürgermeister nicht nehmen, die 400 Teilnehmer aus 22 Ländern in Esperanto ganz herzlich zu begrüßen. Auch die Vertreter der Norwegischen Staatsbahnen (NSB) und des Internationalen Kulturverbandes der Eisenbahner (FISAIC), unter dessen Schirmherrschaft die Veranstaltung stand, versicherten ihre Wertschätzung für die internationale Sprache. Esperanto sei nach dem Fallen der Mauern und Grenzen besonders wichtig, um die Verständigungsschwierigkeiten zwischen den Eisenbahnern zu überwinden.

Fast wie ein Volksfest verlief der Umzug durch die Stadt. An der Spitze des Zuges ließ eine Eisenbahnerkapelle ihre fröhlichen Weisen erklingen. Es folgten Eisenbahner in den schmucken Uniformen ihrer Bahnen, dann die übrigen. Es galt, eine Esperanto-Straße einzuweihen. Die norwegischen Kollegen und örtliche Geschäftsleute stellten sicher, daß die Teilnehmer aus östlichen Ländern in den mit-

geführten Liegewagen übernachten und in einem besonderen Zelt kostenlos gepflegt werden konnten. Für diese großzügige Hilfe dankte der IFEF-Vorsitzende Gießner, der sein Amt nach 22jähriger Tätigkeit zur Verfügung stellte. Sein gewählter Nachfolger, der norwegische Kollege Engen, lobte die zahlreichen Verdienste seines Vorgängers. Die Vertreter der Landesverbände ernannten Herrn Gießner zum Ehrenvorsitzenden. Für den kürzlich verstorbenen Sprachfreund Ritterspach nahm der deutsche Landesverband die nachträglich von FISAIC in Gold verliehene Medaille entgegen. Herr Ritterspach hatte in langjähriger Zusammenarbeit mit ausländischen Experten die Esperanto-Übersetzung des Eisenbahnfachlexikons der UIC herausgebracht.

Ein von Dias begleiteter Fachvortrag befaßte sich mit der Umgestaltung der beiden Bahnhöfe in Oslo zu einer Anlage, dem heutigen Zentralbahnhof. Das neue Empfangsgebäude stellt eine bemerkenswerte architektonische Leistung dar. Kollegen aus neun Ländern berichteten über Neuerungen im Transportwesen ihres Bereichs. Dias und Videofilme ergänzten diese Aktualitäten. Die Verwendung des Esperanto auf eisenbahnfachlichen Gebiet soll vorangetrieben werden, zumal die Ak-

tivitäten der Eisenbahner-Esperantisten, so der Vertreter des Welt-Esperanto-Bundes (UEA), besonders geschätzt werden. Beispielsweise gab die Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk (GEFA) vor kurzem eine Übersetzung von internationalen Rechtsvorschriften für den Eisenbahngüterverkehr heraus. Das Tagungsprogramm sah aber auch kulturelle und touristische Veranstaltungen vor. Die Teilnehmer erlebten einen eindrucksvollen ökumenischen Gottesdienst. Geboten wurde ferner ein Konzertabend und eine Folkloreveranstaltung. Zwei Ausflüge mit Sonderzügen erschlossen die Geschichte eines früheren Bergbaugebietes sowie Wohnen und Leben in mittelalterlichen Holzhäusern. Nach dem offi-

ziellen Ende des Kongresses nahmen viele das Angebot wahr, nach Bergen, der schönsten Stadt Norwegens zu reisen. Dort durchstreiften sie mit Bus, Bahn und Schiff die Fjorde, bewunderten schneebedeckte Höhen und steile Felsen, fuhren durch zahllose Straßen- und Schientunnel und — vergessen wir es nicht — stillten ihren Appetit auf Lachs an reichhaltigen Buffets. Kein Wunder, daß der Dank an die stets freundlichen norwegischen Sprachfreunde sehr herzlich ausfiel. Bleibt noch zu erwähnen, daß der nächste Kongreß der Eisenbahner-Esperantisten von den tschechischen Kollegen in Brno (Brünn) ausgerichtet wird, und zwar vom 11. bis 17. Mai 1991. Ihm folgt eine einwöchige Ferienwoche in Žilina (Sillein). Darüber demnächst mehr. W. B.

GEFA-Herbsttagung 1990

Belgischer Badeort mit drei Buchstaben? Das kann nur Spa sein, ein wegen seiner Heilquellen bekannter Badeort in den Ardennen. Er ist von Aachen in kanpp einstündiger Bahnfahrt zu erreichen. Auf belgischer Seite wird in Verriers Central umgestiegen. In Spa halten vom 1. bis 7. Oktober 1990 die Landesverbände von Belgien, Deutschland, Frankreich, Großbritannien und den Niederlanden ihre Herbsttagung ab. Die Teilnehmer wohnen gemeinsam im reizvoll gelegenen, modernen Ferienzentrum „Sol Cress“, in dem auch die Veranstaltungen stattfinden. Geboten werden u.a. Besichtigungen, Konzerte, Filmvorführungen, Eisenbahnfachvorträge, ein Bankett, eine Folkloreveranstaltung und zwei ganztägige Busausflüge. Also ein anspruchsvolles Programm. Daher ist auch die Bezeichnung „Europäische Eisenbahner-Esperanto-Konferenz“ (Eŭropa Fervojista Esperanto-Konferenco) zu Recht gewählt.

Die Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk lädt Sie herzlich zur Teilnahme ein. Besonders, wenn Sie in diesem Jahr nicht am traditionellen IFEF-Kongreß in Norwegen oder an einer sonstigen größeren Veranstaltung teilnehmen konnten. Bringen Sie auch Ihre Familienangehörigen und Freunde mit. Nutzen Sie die Gelegenheit, bei einem Ausflug die ehemals befestigte Stadt Luxemburg kennenzulernen und von ihren Wällen ins Tal zu schauen. Die Luxemburgischen Eisenbahnen (CFL) werden einen Empfang geben. Ein anderer Ausflug führt zunächst in das romantische Eifelstädtchen Monschau. Es liegt am Dreiländereck von Deutschland, Belgien und den Niederlanden. Fachwerkhäuser spiegeln sich im Fließchen Rur, und hoch oben, auf dem Felsen,

thront die Burg. Dann wird Aachen besichtigt, die westlichste Großstadt Deutschlands, einst Lieblingsaufenthalt Karls des Großen und 600 Jahre lang die Krönungsstadt der Kaiser und Könige. Das gotische Rathaus stammt aus dem 14. Jahrhundert. Der älteste Teil des Domes, der achteckige Kuppelbau der Pfalzkapelle, wurde bereits um das Jahr 800 errichtet.

Und nun zu den Kosten. Die genauen Preise sind auf dem beigefügten Anmeldevordruck in belgischen Franken dargestellt. Der Pauschalpreis in DM beträgt 490 DM für eine Woche Vollpension im Zweibettzimmer einschließlich Bettwäsche, Teilnahme an allen kulturellen und touristischen Veranstaltungen. Für Teilnahme nur am Wochenende (5. - 7. Oktober) werden 250 DM berechnet. Zusätzlich werden erhoben

- bei Anmeldung nach dem 31. Juli: 30 DM; für Teilnehmer am Wochenende 15 DM;
- für Hotelservice (Handtücher, Toilettenartikel, Reinigung): 12,40 DM je Tag und Zimmer;
- für Einzelbelegung eines Zweibettzimmers: 7,50 DM je Tag. Vorauszuzahlen sind 50 DM, die bei Rücktritt nicht erstattet werden können. Wieder einmal ist Gelegenheit gegeben, unsere freundschaftliche Verbundenheit mit ausländischen Esperantisten ohne Verständigungsschwierigkeiten zu pflegen und zu erweitern. Zögern Sie nicht mit der Anmeldung. Sie werden eine außergewöhnliche und zudem preiswerte Tagungswoche erleben. W. B.

Fachvortrag Hamar

Die deutsche Übersetzung des im 42. IFEF-Kongreß gebotenen Fachvortrags über die Umgestaltung des Hauptbahnhofs Oslo ist bei Dieter Hartig erhältlich. Interessenten wollen sie bitte dort abfordern. Anschrift: Kasseler Str. 76, 2800 Bremen 1.

Seniorentreffen in Fulda

Der Einladung zum diesjährigen Treffen der GEFA-Senioren, das erstmals im Frühjahr in der Wochenmitte stattfand, folgten am 19. April 1990 60 Esperantisten aus Nord und Süd. In der Gaststätte des Bahnhofs Fulda hieß Frau Kruse als Organisatorin die Teilnehmer herzlich willkommen. Herr Gießner überbrachte die Grüße des Vorstands der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk und lud zur Herbsttagung ein, die im Oktober 1990 gemeinsam mit den belgischen, britischen, französischen und niederländischen Kollegen in Spa (belgische Ardennen) im Rahmen einer Ferienwoche veranstaltet wird.

Herr Barnickel stellte die gastgebende Stadt vor, deren Geschichte mit einer Klostergründung im 8. Jahrhundert begann. Nach 1000 Jahren geistlich-weltlicher Herrschaft ist Fulda heute eine moderne Stadt in Osthessen, die

stolz auf ihr berühmtes Barockviertel ist. Über die Entwicklung der Eisenbahn im Raum Fulda referierte sachkundig Herr Lautenbach. Besonders aufschlußreich waren seine Ausführungen über die Neubaustrecke Hannover - Würzburg, die über Fulda führt. Humorvolle Gedichte der Kollegen Herlitze, Papenfuß und Scherbl trugen zur allgemeinen Erheiterung bei.

Nach dem gemeinsamen Mittagessen besichtigten die technisch Interessierten das moderne Stellwerk, dessen Bereich weit über den eigenen Bahnhofsbereich hinausreicht. Eine größere Gruppe zog es bei sonnigem Frühjahrswetter in das Barockviertel mit seinem Schloß, dem Park, der Orangerie und besonders dem Dom. Beim Abschied dankten die Senioren Frau Kruse herzlich für die gelungene Veranstaltung und sagten zu, am nächsten Treffen in Minden (Westf.) wieder teilzunehmen.

W. B.



Esperanto-Straße

Seit dem 19. IFEF-Kongreß 1967 gibt es nahe am Bahnhof Fulda eine Esperanto-Straße. Neuerdings führt die Unterführung unmittelbar zur Esperanto-Straße, auf die sechs große Schilder an den Bahnsteigzugängen hinweisen. Eine kostenlose Reklame! (Bild und Text: W. B.)

Bremen:

La MAJA EKSKURSO KUN ESPERANTISTOJ EL ROSTOCK (18an-20an de majo)

estis por ni en Bremen ebleco praktiki la uniĝon de niaj landoj.

Krome: Rostock estas la ĝemelurbo de Bremen!

Tuj post la alveno de niaj gastoj okazis akcepto en la parlamentejo. La referanto por publikaj aferoj, s-ro Reinhard Uhde, salutis la gastojn en Esperanto. Post la oficiala alparolado li invitis al kafotrinkado. Jen ni diskutis kaj ĉefe la gastoj havis la eblecon demandi - en Esperanto, kompreneble.

La gastoj el Rostock estis „disdonitaj“ al niaj grupanoj. Mi konstatis poste, ke neniu enliĝis antaŭ meznokto; tro multaj aferoj estas traktendaj.

Sabaton ni montris al la Rostockanoj nian urbon Bremen kaj tagmeze ni veturis trajne al la beleta antaŭurbo Vegesack. Komune ni manĝis en historia gastejo tipe maristan manĝaĵon: Labskaus.

Kun nova forto ni marŝe esploris Vegesack kaj atingis fine, irante laŭlonge de la Weser-promenejo, la varfon de la pramo al Lemwerder. Tiu ŝipveturado trans la Weser estis gaja afero. En Lemwerder atendis nin geamikoj el nia grupo por kafotrinkado. Sidante en la bela ĝardeno ni ĝuis la trankvilan, sunplenan lokon, la kafon kaj la tre bongustan kukon. Ne daŭris longe, ĝis ni denove diskutis. Kiam niaj DDR-geamikoj tuŝis sian proksiman estontecon, oni sentis la grandan demandsignon; la timon eĉ. Post la komuna vespermanĝo ni veturis hejmen - per la preskaŭ lasta trajno. Dimanĉon ni adiaŭis niajn gastojn sur la kajo. La lastaj vortoj, ofte ripetitaj: „Ĝis revido en Rostock; plej baldaŭ!“

Nia ĉijara Maja Ekskurso estas mejlŝtono por nia grupo: Ni amikiĝis kun tuta grupo da karaj, simpatiaj homoj. Dieter Hartig

La DEFA-Jarkunveno en Aalborg

estis travivaĵo kaj plenplena da interesaj spertoj por ni. Tial indas raportoj en nia Bulteno pri la jarkunveno de la danaj fervojistoj.

Ni, Dieter kaj Lisa Hartig, estis invitatitaj partopreni kaj informi prelege pri la laboro de la Terminara Komisiono de IFEF.

La suno afable brilis dum nia vojaĝo tra Danio. Ni estis ravitaj pri la belega regiono: paŝtejoj, dunoj kaj arbaroj alternis kaj mire ni konstatis, kiel maldense la lando estas loĝata. Niaj danj kunvojaĝantoj klarigis kaj rakontis al ni multon pri la aferoj laŭlonge de la itinero. Ili klopodis

paroli germane. Ni rakontis pri la celo de nia ekskurso. Fine oni petis nin interparoli en Esperanto kaj ni surprizis niajn auskultantojn - espereble ni metis jen semerojn.

Henning Haug kaj lia kara edzino Erna akceptis kaj gastigis nin. Kun danko ni pensas al la bela tempo kune kun ili. Tiuj horoj rekompenas por la aktiva kunlaboro kaj la klopodoj por Esperanto. Ni longe parolis pri nia movado kaj tuŝis preskaŭ ĉiun problemon.

Ni ja partoprenis al multaj kongresoj kaj konas tial la plejmultojn el la danaj Esperantistoj. Estis gaja revido kun la danaj kaj ankaŭ svedaj geamikoj - estis feliĉa momento.

Oni invitis nin partopreni en la estrarkunsido. Ni alte taksis tiun konfidon kaj honoron. Mi ja estis speciale scivola pri ilia maniero aranĝi tian kunvidon kaj komparis ĝin kun nia metodo. Ĝenerale mi kun respekto povas diri, ke mi admiris la labordisciplinon. Koncentrite oni laboris kaj klopodis severe pri la solvo de la problemoj.

Precipe fruktodona estis, laŭ mia opinio, la laŭvica raporto de ĉiuj funkciuloj pri iliaj aktivecoj, laboroj, intencoj kaj celoj. Oni traktis ĉiun raporton severe kaj konsilis aŭ pripensis komune la situacion.

Alia menciinda afero estas la strukturŝanĝo en la DEFA-estraro. Anstataŭ prezidanto oni nun balotis pri „kunordiganto“ kaj „respondeculo“ pri la diversaj taskoj. La situacio ŝajnis al mi tiel pozitiva, ke mi rekomendas observi la evoluon kaj pruvi la utilon por nia GEFA. Sed - la nova situacio en nia lando sendube alportos ankaŭ por nia movado tiom da ŝanĝoj kaj espereble ankaŭ novaj pli junaj estraranoj, ke ni atendu la evoluon. Sed tamen: ni observu la certe pozitivan situacion en Danio.

La simpatia Astrid Birkbak nun ne plu estas prezidantino, ŝi demisiis. La adiaŭo de ŝia posteno estis tre bela ceremonio.

La DEFA-Jarkunveno okazis en la kadro de Komunana Dana Jarkongreso. Ĉiuj partoprenantoj kunvenis vespere en la granda salono de altlernejo Aalborg. Okulfrapis jen la giganta bufedo, kiu etendiĝis sur multaj tabloj. Niaj danaj geamikoj montris al ni, kiamaniere oni devas „ataki“ la frandaĵojn. Estas nepriskribeble, kiom da belaspektaj kaj bongustegaj aĵoj kolektiĝis!

La humoro estis rimarkinde bona. Multaj ĉeestantoj gaje parolis, kantis aŭ prezentis humoraĵojn. Estis tre agrabla etoso. El Karlskoga, Svedio, partoprenis s-ro Forsmann kun membroj el sia grupo. Ili prezentis modernajn

kanzonojn kaj akompanis sin per gitaro. Nia bremena grupo amike rilatas kun tiu el Karlskoga. Ni speciale festis tiun renkonton.

Ni dancis kaj travivis feliĉajn horojn. Nur matene ni enliĝis. Al tiu nokto mankis unu horo pro la komenco de la somertempo. Ni do devis rapide dormi.

Dimanĉon matene akceptis nin la urbestro. Ni aŭdis multon pri la historio de Aalborg kaj ankaŭ pri la multaj ĝemelaj urboj, el kiuj ĉeestis kelkaj anoj inter ni.

Poste estis mia vico raportari pri la traduklaboro de fervojistoj en la Terminara Komisiono. Per tiu prelego mi esploris, ĉu la temo taŭgas por la fakprelego en nia IFEF-kongreso en Münster. El la reagoj de la geaŭskultantoj kaj la posta raporto en la DEFA-Bulteno mi povas konstati, ke la temo ne nur atingas 'fakulojn', sed la tutan publikon.

Venis baldaŭ la adiaŭo. Sidante en la trajno hejmen, ni konstatis, ke ni havas multajn karajn amikojn en Danio - kaj ĉifoje ni sendube povas aldoni ankoraŭ kelkajn novajn.

Ni povas konsili, ne hezitu, se vi havas la eblecon partopreni al DEFA-kunveno.

Dieter Hartig

Aus den Bezirken und Gruppen

Frankfurt/Main

Die BSW-Gruppe lädt zu den monatlichen Zusammenkünften am 21.8., 18.9., 13.11. und 18.12.1990 im sogenannten Besprechungszimmer 111 in das sogenannte Ämtergebäude gegenüber dem Nordausgang Ffm Hbf jeweils um 16.30 Uhr ein. Gäste sind herzlich willkommen. Das Programm kann den Mitteilungen des BSW Ffm, 1. Dritteljahr 1990, entnommen werden.

Nürnberg/Lichtenfels

Die Mitglieder treffen sich nomatisch zu einem Konversationskurs bzw. einem Gruppenabend in der Gaststätte „Wallachei“ in Lichtenfels (Nähe Bahnhof)

Esperanto-Bibliothek:

BSW spendete Übersetzung

In Aalen wurde die Erste Deutsche Esperanto-Bibliothek feierlich eröffnet. Die Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im BSW (GEFA) steuerte eine Übersetzung bei.

Mit rund 10 000 bibliothekarischen Einheiten ist die Deutsche Esperanto-Bibliothek nach Rotterdam, London und Wien die viertgrößte der Welt, gefolgt von den Esperanto-Bibliotheken in La Chaux-de-Fonds, Schweiz, und Sofia, Bulgarien.

Nachruf

Unser Mitglied der örtlichen Esperantogruppe „Luma ŝtonego“, Eisenbahner-Esperantogruppe Lichtenfels und Bayerischen Esperantoliga

Wendt Hardo (geb. am 10.10.1920)

ist nach längerem Krankenhausaufenthalt am 13. Mai 1990 unerwartet verstorben.

Mit Wendt Hardo verlieren wir ein langjähriges, treues Mitglied. Ihm verdanken wir, daß auch im Coburger Raum Esperanto bekannt und gelernt wurde.

Er nahm regelmäßig an den Esperantoveranstaltungen in Coburg und Lichtenfels, sowie an vielen Jahrestagungen und Kongressen der Eisenbahner-Esperantisten im In- und Ausland und an den Treffen der Bayerischen Esperanto-Liga teil.

Mit seiner Familie, der wir unser tiefstes Beileid aussprechen möchten, trauern wir um einen großen Idealisten unserer Esperantobewegung.

Wir werden ihn nie vergessen.

GEFA

Funkciuloj atentul!

Kiel konate, nia oficiala laborkunveno okazos dimanĉon, 30.9. en Aachen. Por la nokto 29./30.9. mi rezervis tie ĉambrojn por du personoj kaj por unuopuloj en hotelo tutproksima al la stacidomo. La kunveno okazos sub samaj kondiĉoj kiel ĉiujare dum la jarkunveno. Invitiloj sekvos en aŭgusto rekte al vi kaj ankaŭ tra BSW-ĉefestraro al la BSW-distriktestraroj. Por povi plani, mi petas ĉiujn Bba kaj komisiitojn pri specialaj taskoj, informi min nepre ĝis 10.8., ĉu vi mem venos, ĉu sola aŭ kun edzino, aŭ ĉu vi sendos anstataŭanton. Tiuj kiuj poste partoprenos en la Eŭropa Fervojista Esperanto-Konferenco en Spa, veturos dimanĉon posttagmeze de Aachen al Spa. Tiujn mi petas, same ĝis 10.8. informi min pri nombro de la personoj, ĉar necesos aranĝi apartan vespermanĝon kaj tranoktadon en Spa.

Gießner

Fervojaj novaĵoj

Horaro

Ek de la venonta somerperiodo 1991 la du germanaj fervojoj (DB kaj DR) eldonos komunan horaron. Tio okazos la unuan fojon post la milito.

Tunelo

Nova submara fervojtunelo estos konstruata inter la danaj insuloj Seeland kaj Sprogø. La distanco estas 7,4 km. Supozeble en 1993 trafiko tra tiu tunelo la unuaj trajnoj inter Flensburg kaj Kopenhago.

Nostalgio

La usona fervojkompanio Amtrak ankaŭ volas profiti de la nuntempa porfervoja nostalgio. Ĉiutage trafikos du renovigitaj Pullmann-vagonoj inter Oakland kaj Los Angeles, unu el la plej belaj linioj en la ŝtato Kalifornio.

Lokomotivo

SDZ, la sovetaj fervojoj, disponas laŭ propra eldiro pri la plej forta vartrajna lokomotivo en la mondo. Tiu maŝino konsistas el du sesaksaj sekcioj; kun entute 11 400 kiloatoj (alternkorento) ĝi povas transporti vartrajnojn de 6 000 tunoj. La maksimuma rapido estas 110 km/h.

Specialvagono

Por senŝarĝigi la tro fortan trafikon de ŝarĝaŭtomobiloj inter Germanio kaj Italio nuntempe estas elprovata nova tipo de speciala varvagono. Tiu ĉi havas dek ĝis dekdu aksojn kun radoj de ekstreme malgranda diametro. Por tio la porkarga ebena estas tre malalta, kio ebligas tra la alpaĵ fervojtuneloj transporton de kargitaj kamionoj altaj ĝis 4 metroj kaj pezaj ĝis 44 tunoj.

El „Blickpunkt“ komp. de W. B.

Danlando

Mallongaj IC-motorvagonoj por pramtrafiko

En Danlando estas produktataj nuntempe 23 dizel-hidraŭlikaj IC-trajnoj, kies kompleta elektra ekipaĵo estas liverata de la firmao AEG el FR Germanio. Tiuj novaj trajnoj ruliĝu en IC-trafiko sur Zelando kaj Jutlando. Pro tio la trajnlongeco de la triparta trajno devis esti akordigata kun la pramŝipo je 59 m, ĉe kio ĉiu unuopa vagono kun 19,6 m estas pli mallonga ol la normalaj IC-vagonoj, kiuj mezuras 26,4 m. La unua motortrajno estis liverata jam en januaro 1988. Ĝis meze de la naŭdekaj jaroj estos liverataj entute 80 tiaj trajnoj.

Redaktfino por n-ro 4/90 estas la 20. 8. 1990

Malajzio:

La nord-suda magistralo estas modernigota. La nord-suda magistralo de la Malajziaj Ŝtataj fervojoj (Keretapi Tanah Melayu KTM), estas modernigota kaj ŝanĝkonstruota por pli altaj rapidecoj. Planita estas i.a. nova dutraka normalŝpura linio, sur kiu la trajnoj inter Butterworth kaj Singapuro veturu per rapideco de 160 km/h. Kiel plia ebleco estas planita dutraka linio de la estanta eŝpura linio, ĉe kio ankaŭ mallarĝaj kurboj estu rektigitaj.

El Blickpunkt 3/87 tradukis
† Fritz Busse

Kanado:

La Chicago — Laser — Servo estas nova oferta de kamion-survagona trafiko. La trajnoj trafikas sesfoje en la semajno inter Chicago kaj Toronto, same inter Chicago kaj Montreal. Tiuj rapidaj kaj fidindaj interligoj estas ĉefe uzataj por frukto kaj legomtrafiko el la sudokcidento de Usono.

La mallonga transportdaŭro de 13 horoj inter Chicago kaj Toronto kaj 23 horoj inter Montreal estas efika konkurado al la ŝosea trafiko.

Esperanto-Fernkurs jetzt neu: Teil II

Esperanto ist eine internationale Sprache. Die Grammatik ist einfach und logisch; sie besteht nur aus wenigen kurzen Regeln. Es gibt keine Ausnahmen und Unregelmäßigkeiten.

Esperanto wurde für die internationale Kommunikation geschaffen.

Der neu aufgelegte Esperanto-Sprachkurs mit Lernbuch, Tonbandkassette und brieflicher Betreuung ermöglicht es, daß jeder zu Hause Esperanto lernen kann. Zeitpunkt des Beginns, tägliche Dauer, Umfang, Lern tempo kann jeder selbst bestimmen. Experten beraten schriftlich, individuell und nach jedem Lernschritt.

Kurskosten: Teil I 30,— DM, Teil II 40,— DM
Bestellung: Einzahlung auf das
Postgirokonto 61 150-466
beim Postgiroamt Dortmund.

Empfänger: Joachim Schrapp,
Schmittingheide 17 d,
4400 Münster (Westf.)

EDS-Anschrift:

BSchule 440 Münster (Westf.).

Herausgeber/eldonanto Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks. Frankfurt (Main). Schriftleitung / redakcio: Wilhelm Graß, 8620 Lichtenfels, Sachsenstr. 7, Druck/preso: Druckerei Jungfer, 3420 Herzberg am Harz